

## Enhavo

1	Pasintaj aranĝoj .....	2
1.1	Stenografioj kaj planlingvoj: pri nekutima kolokvo en Dresden (Detlev Blanke) .....	2
1.2	Utopio kiu iĝis realo (Federico Gobbo) .....	3
2	Estontaj konferencoj.....	4
2.1	35-a esperantologia konferenco 2013 en Rejkjaviko .....	4
2.2	Konferenco en Ukrainio: Interago de etnaj kaj planitaj lingvoj en Eŭropo .....	4
2.3	23-a konferenco de GIL 2013: “Interlingvistiko en la 21-a jarcento” .....	5
2.4	13th International Congress for the Study of Child Language .....	5
3	El universitatoj kaj altlernejoj.....	6
3.1	<i>Universalsprachen</i> – ekspozicio en Humboldt-Universitato de Berlin .....	6
3.2	Universitata laboraĵo: <i>Jerzy Walaszek</i> .....	6
3.3	Interlingvistiko kaj Esperantologio ĉe UAM/Poznań (Ilona Koutny) .....	6
3.4	<i>Federico Gobbo</i> gvidos la katedron en Amsterdamo .....	7
3.5	Agnosko de la agado de AIS –Bulgario flanke de Bulgara Akademio de Sciencoj (Boĵidar Leonov).....	7
4	Faka komunikado .....	8
4.1	Eseoj de <i>Wera Blanke</i> pri terminologia agado en Esperanto.....	8
4.2	Gvidlinioj de UNESCO: politiko pri terminologio nun ankaŭ en Esperanto .....	10
4.3	Spertaj profesiuloj pri lingvoj partoprenu normigan laboron (Mélanie Maradan).....	10
4.4	4401 sciencaj kaj fakaj verkoj en Esperanto.....	11
4.5	<i>Scienca Revuo</i> sur DVD-o.....	12
5	<i>Language Problems &amp; Language Planning (LPLP)</i> .....	13
5.1	Enhavo de Vol. 36 (1-3/2012) .....	13
5.2	Nova ĉefredaktoro de LPLP: <i>Prof. Timothy Reagan</i> .....	15
6	Honorigo de <i>Helmar Frank</i> okaze de lia 80-a naskiĝtago .....	16
6.1	La festlibro.....	16
6.2	Publikaĵoj de <i>Helmar Frank</i> en Esperanto.....	17
7	Bibliografio de <i>prof. KIMURA Goro Christoph</i> .....	23
7.1	Biografieto .....	23
7.2	Publikaĵoj .....	23
8	<i>Wim Jansen</i> – nova bibliografo ĉe MLA.....	31
9	IEMW skanas historiajn Esperanto-revuojn .....	31
10	Bibliografiaj informoj.....	32
10.1	Selekta bibliografio pri interlingvistiko kaj esperantologio.....	32
10.2	Fundamenta verko pri stilaj esprimiloj de Esperanto de <i>Till Dahlenburg</i> .....	32
10.3	Novaj libroj pri <i>Zamenhof</i> .....	32
10.4	Klasika verko de <i>Albert L. Guérard</i> en la reto.....	32

# 1 Pasintaj aranĝoj

## 1.1 Stenografioj kaj planlingvoj: Pri nekutima kolokvo en Dresden

La 13-an de aprilo 2013 en la germana urbo Dresdeno (Saksio) okazis nekutima scienca kolokvo sub la nekutima kadra temo „La stenografia kolekto en la epoko de Interreto“. Ĝi trovis lokon en la „Talleyrand-salono“ (ankaŭ nekutima loko, ĉar tie troviĝas la biblioteko kaj arkivaĵoj de la fama franca politikisto, ĉar – strange – en Francio oni ne trovis konvenan lokon...). La salono troviĝas en la „Saksia Landa, Ŝtata kaj Universitata Biblioteko Dresden“ (germana mallongigo SLUB).

Dum la kolokvo do temis pri stenografio kaj, inter alie, pri ties rilatoj al planlingvoj (ĉefe al Esperanto, sed ne nur). La okazigo de la kolokvo kaj la surprize grava rolo, kiun en ĝi ludis planlingvoj (pri kiuj oni aparte mendis du prelegojn), havis almenaŭ tri motivojn:

La *ĉefa motivo* estis la 145-a naskiĝtago de la grava germana stenografo *Felix von Kunowski* (10.4.1868-1.12.1942, Feliks de Kunovski). Kune kun sia frato *Albrecht* li kreis stenografiajn sistemojn. Aparte konatiĝis lia fonetika (artikulacia) stenografio, aplikebla al multaj lingvoj, kun la germana nomo ‚Sprechspur‘. En Esperanto ĝi konatiĝis kiel ‚Parolspuro‘. Kunowski mem estis esperantisto kaj lia sistemo kompreneble trovis adeptojn en la movado. Inter 1987 kaj 1998 eĉ agis la faka organizaĵo „Tutmonda Parolspuro-Asocio“<sup>1</sup>, aliĝinta al UEA. La ampleksa postlasaĵo de Kunowski kaj materialoj de la menciita asocio antaŭ nelonge estis transdonitaj al SLUB, kiu (pro kompleta novkonstruo antaŭ dek jaroj) nun posedas du domegojn kaj estas unu el la plej moderne ekipitaj bibliotekoj de Germanio.

La *dua motivo* por la kolokvo estis la fakto, ke en la menciita saksia biblioteko troviĝas la tutmonde plej granda kolekto de verkoj en aŭ pri stenografioj en multaj lingvoj. Ĝi aktuale ampleksas pli ol 52 000 bibliografiajn erojn en 52 lingvoj. Inter ili troviĝas 86 eroj kun ligoj al planlingvoj: Volapuko (5), Idio (6), Occidental-Interlingue (2) kaj Esperanto (73).

La *tria motivo* estis, ke la grava germana esperantisto *Albert Schramm* (1880-1937) ankaŭ estis eminenta stenografo (li preferis la sistemon Gabelsberger). Li ne nur kunorganizis la 4-an Universalan Kongreson de Esperanto 1908 en Dresdeno, sed dum la kongreso ankaŭ iniciatis la fondon de la Saksia Esperanto-Instituto, kiun li gvidis de 1908 ĝis 1913. De 1904-1913 Schramm estis gvidanto de la „Reĝa Stenografia Instituto Dresden“ (poste parto de la saksia biblioteko), kiun li signife konatigis, pligrandigis kaj tie katalogis la stenografian kolekton. Tiu kolekto en 1911 jam ampleksis 25 000 erojn. Do, sendepende de Esperanto, Schramm al si certigis honoran lokon en la saksia biblioteko.

Ĉio ĉi estis sufiĉa kialo, ke la Asocio de Amikoj de SLUB, sub gvido de *prof. d-ro Dagmar Blei*, aranĝis la kolokvon, kune kun la ĝenerala direkto SLUB mem, la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL) kaj la Rondo de Esperanto-Amikoj en la Teknika Universitato Dresdeno.

Pli ol 30 personoj, grandparte stenografoj kaj eble 7 esperantistoj, post la enkondukaj vortoj de la ĝenerala direktoro de SLUB, *prof. d-ro Thomas Bürger*, aŭskultis jenajn kvin prelegojn:

---

<sup>1</sup> Kiel oni povis legi en „Esperanto aktuell“ 2/2013, p. 17, la siatempa prezidanto de la „Tutmonda Parol-Spuro-Asocio“, *Herbert Köhrmann* el Wuppertal/Germanio antaŭ nelonge (30.01.2013) festis sian 100-an naskiĝtagon. Ni aliĝas al la bondeziroj.

*Frank Aurich* informis pri la pozicio de la stenografia kolekto kadre de la biblioteka Kolekto de Manuskriptoj, kiun li gvidas.

La gvidantino de la Stenografia Kolekto, *Rosemarie Hänsel*, raportis pri la transprenita Kunkowski-arkivo (pli ol 40 skatolegoj) kaj ties ciferecigo kaj enretigo. *Sekvis mia prelego*, en kiu mi prezentis la rilatojn inter stenografioj kaj planlingvoj surbaze de por mi tute nova kaj surprize riĉa materialo (helpe de kelkaj fontoj mi kompilis bibliografion de 235 eroj, kiu aperos en unu el la sekvaj eldonoj de IpI).

La instruisto *Klaus Buchheister* el Hanovro, kiu mem instruis la parolspuron al infanoj, inter ili legasteniaj, prezentis la sistemon de tiu ĉi invento de Kunowski kaj la rezultojn, kiujn li atingis ĉe infanoj.

*Prof. d-ro Sabine Fiedler*, anglistino ĉe la Universitato de Leipzig kaj nuna prezidantino de GIL (ekde 2011), prezentis interlingvistikajn aspektojn de la ‚parolspuro‘ de Kunowski, komparante la propedeŭtikajn funkciojn de ĝi kun tiuj de Bliss-simbolaro kaj skriboj inventitaj de Tolkien (ekz. Tengwar).

Post la prelegoj okazis vigla diskuto, i.a. pri la interretaj ebloj pli larĝe informi pri la unika stenografia kolekto kaj la rilatoj al planlingvoj.

La finon kronis la gvidado de la ĝenerala direktoro tra la „trezora ĉambro“ de SLUB, kie eblis admiri i.a. originalajn partojn de la kalendaro de la Majaĵoj (ekzistas nur tri savitaj originaloj en la mondo), ampleksan manuskripton de Martin Luther, grafikaĵojn de Albrecht Dürer, notojn de Richard Wagner kaj Ludwig van Beethoven....Entute rimarkinda aranĝo.

[detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de)

## **1.2 Utopio kiu iĝis realo**

### **Resumo de la prelego pri la Esperanto-Urboj en Pescara, Italio**

*Federico Gobbo*

La 2-an de Marto 2013 Federico Gobbo, laŭkontrakta profesoro pri planlingvistiko ĉe la Universitato de Torino, Italio, kaj postdoktora esploristo en informadiko ĉe la Universitato de La-Aglo (L'Aquila, Italio), estis invitita al la premio de *Nicolò Cristaldi*, urbestro de Mazaradelvalo (itale: Mazara del Vallo), Sicilio, Italio, por ties interkultura kaj poresperanta agado. Ĉi-tie sekvas la resumo de la prelego:

La vorto 'utopio' estis inventita de Tomaso Moro (Thomas More, 1478-1535), angla humanisto, kiu postulis perfektan socion per aro da urboj, kies politiko kaj gento estu uniforma kaj optimuma. Tradicie, en la post-mezepoka Eŭropa periodo, politikaj kaj sociaj novaĵoj venas de urboj, kontraste kun la kamparo.

Ne estas do hazardo, ke la ununura ideo pri Esperanto al Zamenhof venis per observado de la propra urbo *Bjalistoko*. Lastatempe Bjalistoko revalorigis sian ligon kun la iniciatoro de Esperanto, per muzeoj kaj aliaj kulturaĵoj, kaj prave ĝi povas esti konsiderata la unua Esperanto-Urbo.

La dua estas urbo meze de Germanio, nome *Herzberg/Harcmontaro*, kiu interpretis Esperantismon per servoj al la esperantofonoj, kiel kongresejo, kafejo, hotelo en la lingvo, tiel, ke la parolantoj povas sin senti ĉe hejmo. La tria kaj lasta Esperanto-urbo estas *Mazaradelvalo*, kies multkulturismo estas jarcenta realo, ĉar ĝi estas la plej proksima Sicilia urbo al Tunizio, kaj nuntempe enhavas 25 lingvogrupojn, ekde la ĉina al la ukraina ĝis precipe la tunizia variaĵo de la araba. En Mazaradelvalo fakte troviĝas unu el la plej grandaj kasbahoj

(araba fortikaĵo) de Eŭropo. Esperanto tiel estas simbolo pri kulturo de respekto, krom oportuno por disvolviĝi la tiean ekonomion kaj kulturon.

## 2 Estontaj konferencoj

### 2.1 35-a esperantologia konferenco 2013 en Rejkjaviko

Kadre de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko (20.-27.7.2013) okazos ankaŭ Esperantologia Konferenco de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Unuafoje enprogramita en la Varna Universala kongreso de 1978, en Rejkjaviko okazos jam la 35-a sesio.

Por informo pri tiuj konferencoj vidu la artikolon en Vikipedio:

[www.eo.wikipedia.org/wiki/Esperantologia\\_Konferenco](http://www.eo.wikipedia.org/wiki/Esperantologia_Konferenco)

La Konferenco celas doni eblecon prezenti rezultojn de novaj esploroj kaj ebligi sperto-interŝanĝon kun aliaj esperantologoj. La prelegoj estos poste eldonitaj kiel aktoj. Laŭ decido de CED organizos ĝin la svedo prof. Christer Kiselman kaj la svisino Mélanie Maradan. ([christer@kiselman.eu](mailto:christer@kiselman.eu); [melmарadan@yahoo.fr](mailto:melmарadan@yahoo.fr) )

### 2.2 Konferenco en Ukrainio: “Interago de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo“

Sub aŭspicio de Ministerio pri Klerigo, Scienco, Junularo kaj Sporto de Ukrainio en la „Orienteŭropa Nacia Universitato Lesja Ukrainka” en Lucjk/Ukrainio (Katedro pri Romanidaj Lingvoj kaj Interlingvistiko kaj Katedro pri Aplikata Lingvistiko) 20-21-an de septembro 2013 okazos internacia scienca konferenco.

#### **La ĉefaj temoj de la konferenco estas jenaj:**

- Sociolingvistikaj aspektoj de lingvo-uzado en Eŭropa Unio kaj la najbaraj landoj
- Etnolingvistikaj aspektoj en la pristudo de lingva interago
- Lingvokulturaj aspektoj en la analizo de etnaj kaj planitaj lingvoj
- Aktualaj demandoj de nuntempa interlingvistiko
- Specifiko de nuntempa interkultura komunikado en Eŭropa Unio kaj la najbaraj landoj
- Konceptaj kaj lingvaj mondbildoj en etnaj lingvoj (kompara aspekto)
- Teksto kaj diskurso kiel lingvaj fenomenoj en la aspekto de lingva interago
- Studoj pri kontrastiva lingvistiko kaj tipologio de etnaj kaj planitaj lingvoj
- Lingvopragmatika pristudo de etnaj kaj planitaj lingvoj
- Lingva interago sur fonetika, gramatika kaj leksika niveloj
- Interago de literaturaj lingvoj kaj regionaj, sociaj variantoj
- Studoj pri lingvo-folkloristiko en apudlimaj regionoj
- Studoj pri nuntempaj terminologiaj sistemoj laŭ aspekto de interago
- Oficiala(j) lingvo(j) kaj ŝtata(j) lingvo(j); dulingveco, plurlingveco; prioritataj kaj minoritataj etnolingvoj
- Gepatra lingvo en lernado kaj edukado
- Instruado de fremdaj lingvoj en Eŭropa Unio kaj la najbaraj landoj
- Atingoj de la eŭropa leksikografio sur la kampo de etnolingvistikaj kaj lingvokulturaj vortaroj
- Gravaj demandoj pri teorio kaj praktiko de tradukado en etnaj kaj planitaj lingvoj
- Aktualaj problemoj de lingva interago en amaskomunikiloj
- Komputila morfologia, sintaksa kaj semantika analizoj de tekstoj
- Kompilado de lingvaj komputilaj datumbazoj.

Estas planitaj jenaj **rondaj tabloj**:

“Etnaj stereotipoj en internacia kaj interpopola komunikado”,  
“Funkciado de internacia lingvo Esperanto kaj ĝiaj studoj”.

**Laborlingvoj** estos la ukraina, rusa, belorusa, pola, angla, germana, franca, hispana kaj Esperanto.

**La materialoj** de la konferenco estos publikigitaj en la faka scienca revuo de Orientŭropa nacia universitato “Naukovij Visnik” antaŭ la komenco de la konferenco.

La **aliĝilon** (familia nomo, persona nomo, posteno, scienca grado, laborloko, en kiu lingvo vi prelegos kaj en kiuj lingvoj vi parolas, adreso, kontaktaj telefonnumeroj, retroŝto, bezono de loĝloko) kaj la tekston de la prelego bonvolu sendi al la suba adreso. Tie ankaŭ eblos ricevi pliajn detalajn informojn:

Ukrainio, 43025 Lucjk, pr. Voli, 13,

Katedro pri Romanidaj Lingvoj kaj Interlingvistiko al Danylyuk Nina

Lab. tel.+38 (0332) 24-65-47, retroŝto: [nina\\_daniljuk@ukr.net](mailto:nina_daniljuk@ukr.net);

[nina.danylyuk@gmail.com](mailto:nina.danylyuk@gmail.com)

Poŝ. tel. .+38 (067) 8987777; +38 (050) 8587577.

### **2.3 23-a konferenco de GIL 2013: „Interlingvistiko en la 21-a jarcento“**

La 23-a konferenco de *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (GIL, Societo pri Interlingvistiko) okazos denove en Berlino, ĉi-jare de 29.11.-01.12.2013. La ĉeftemo estos „Interlingvistiko en la 21-a jarcento“. *La konferenca lingvo estas la germana.* La prelegoj aperos en la aktoj de GIL (Beihefte). Ĝis nun aperis entute 19 volumoj. Informojn pri la konferenco oni trovos sub <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/pages/neuigkeiten.php>.

Aliĝilojn oni sendu al la prezidantino de GIL:

*Prof. Dr. Sabine Fiedler*, Am Zollamt 5, 04838-Jesewitz, [sfiedler@uni-leipzig.de](mailto:sfiedler@uni-leipzig.de).

### **2.4 13th International Congress for the Study of Child Language**

De 14.-18. Julio 2014 en Amsterdam okazos la 13-a Internacia Kongreso pri la infana lingvo, supozeble en la angla:

Abstract submission by September 15th, 2013.

Registration open as of December 15th, 2013.

Deadline for submissions (symposia and individual posters): September 15th, 2013

#### Practical information

Please, check the website regularly for practical information about the conference venue, travel to and accommodation in Amsterdam, parallel events, etc.

A provisional program will be posted online as soon as possible after acceptance of attendance has been received

#### Contact Information

For any inquiries you may have regarding the IASCL Amsterdam 2014 Conference, please contact The UvA conference office at: [Conference@uva.nl](mailto:Conference@uva.nl) (please mention IASCL2014 in subject line).

<http://www.iascl2014.org/> This website will be regularly updated, so please check back later for additional news and information about the conference.

## 3 El universitatoj kaj altlernejoj

### 3.1 *Universalsprachen* – ekspozicio en Humboldt-Universitato de Berlin

En la ĉefkonstruaĵo de Humboldt-Universitato de Berlin de 7-a de januaro ĝis 1-a de februaro 2013 estis prezentita originaleca ekspozicio kun la titolo „*Universalsprachen*“ (universalaj lingvoj). Ĝi estis iniciato de studentoj kun subteno de Kleine Humboldt-Galerie. Tio estas institucio, fondita en 1978 de teamo de laborantoj de la universitato, kiu organizis jam 190 ekspoziciojn. La menciita ekspozicio ligas al la ideo de ‚universalaj lingvoj‘ diversajn esprimilojn, ne nur lingvajn, sed ankaŭ grafikaĵojn, formulojn (por kontaktoj kun aliplanedanoj...) ktp. Ankaŭ Esperanto ĉeestis: Inter la video-instalaĵoj troviĝis filmeto, kiu montras la esperantiston *Daniel Salomon* el Israelo, kiu instruis bazan scion pri kemio en Esperanto ...al nesciantoj de la lingvo en la Universitato de Varsovio/Pollando. Oni krome trovis aludojn al la piktogramoj de la aŭstra sociologo *Otto Neurath* (1882-1945) kun sia projekto ISOTYPE („International System of Typographic Picture Education“) kaj Basic English de *Charles K. Ogden* (1889-1957).

Sur aparta tablo troviĝis tute sufiĉa interlingvistika fakliteraturo (i.a. de *Couturat/Leau, Blanke, Fiedler, Haupenthal, Janton, Sakaguchi, Schubert, Wells...*)

(La ekspozicion subtenis jenaj artistoj per siaj kreaĵoj: [epidemiC]/Franco Berardi, Vera Buhß, Yoonhee Kim, EunHee Lee, Magma, Milovan DeStil Marković, Otto Neurath, Ben Patterson, Mike Ruiz, Daniel Salomon, Edward Tufte, Ivar Veermäe.)

### 3.2 Universitata laboraĵo: *Jerzy Walaszek*

*Walaszek, Jerzy (2012): Katalogo de Esperanta literaturo. Esperanta-Pola versio. Katalog literatury Esperantskiej. Wersja Esperancko-Polska. Sosnowiec: Pola Esperanto-Asocio, 229 p.*

(La katalogon kiel bakalaŭran laboraĵon akceptis la Instituto de Bibliotekscienco kaj Sciencinformado de la Filologia Fakultato de la Silezia Universitato Katowice/Pollando. La laboron gvidis *dr. habil. Anna Tokarska*).

### 3.3 Interlingvistiko kaj Esperantologio ĉe UAM/Poznań

Jam de 15 jaroj la fino de septembro kaj komenco de februaro estas dediĉitaj al la intensaj sesioj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. Ili havas firman lokon en la universitata paletro kaj proponas universitatnivelan studadon kun fina atestilo al ambiciaj esperantistoj. Ili entreprenas ankaŭ la formadon de esperanto-instruistoj. En la tria jaro de la Studoj okazas instruista specialiĝo. Kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net tio kiel instruista trejnado estas ofertata ankaŭ al pli vasta publiko, kiu volas instruistan spertiĝon dum unu jaro. Simila kurso jam estis organizata kelkfoje kun la gvido de Katalin Kovats. Aliĝantoj estas atendataj por la septembra sesio (14-20). Informoj: en la retpaĝo de la Studoj kaj [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl).

La 5-a grupo de la Interlingvistikaj Studoj travivis sian 4-an sesion de la 2-8-a de februaro en Poznano. Kvankam la nombro de studantoj iom malpliiĝis, la persistuloj (4 el Brazilo, po 2 el Svislando kaj Pollando, po unu el Germanio kaj Rusio) aktive partoprenis la sesion. Stipendioj de ESF kaj ILEI-UEA daŭre helpas al kelkaj.

*Aleksander Korĵenkov*, ruslanda eldonisto kaj esploranto lekcias pri la historio de esperantomovado: skizis la ĉefajn eventojn, konfliktojn kaj tendencojn en Esperantujo, kiuj fojfoje surprizis la studentojn, kaj montris la kaŭzojn de tiuj ŝajnaj neklarigeblaĵoj.

La lingvistikajn kursojn gvidis *Ilona Koutny* multe diskutante kun la gestudentoj. Ŝi prezentis la semantikan sistemon de esperanto, kun ĝiaj fontoj kaj memstara evoluo, analizis la semantikajn rilatojn inter la elementoj de la vortoprovizo kaj la frazeologiaĵojn, tuŝis la

problemon de lingvotavoloj kaj provis trovi la lokon de esperanto inter la etnaj lingvoj perhelpe de lingvotipologio kadre de gramatika kurso. Ŝi esploris la specifaĵojn de la esperanta lingvouzo en diversaj eventoj kaj ĝentilecformoj kadre de pragmatiko. Kurso pri aplikata lingvistiko enkondukis i.a. al lingvoplanado, tradukado, leksikografio, terminologio kaj komputa lingvistiko.

Al la programo kontribuis *Zbigniew Galor*, profesoro pri sociologio, per prelego pri socio kaj lingvo. Gastprelegis *Christoph Goro Kimura*, profesoro pri lingvistiko el Tokio, pri la interlingva komunikado, pri la interna ideo kaj la neeŭropa aliro al esperanto. Li revenos en aprilo por prelegi en la Lingvistika Instituto pri siaj esploroj – laŭ la invito de la institutestro. La bonetosan kaj riĉan kursaron kompletigis la komuna vespero en la fervojista domo, kie la partoprenantoj prezentis poemojn kaj *Mirejo Grosjean* parolis pri afrikaj etosoj. Post la kurso okazis ekskurso al Vroclavo, kie la lokaj esperantistoj gvidis nin tra la urbo.

*Prof. Dr. habil. Ilona Koutny, gvidantino de la Studoj*  
<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

### **3.4 Federico Gobbo gvidos la katedron en Amsterdamo**

La kuratoroj de la katedro Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo rekomendas la italan lingviston *Federico Gobbo* kiel la novan estron de la katedro. D-ro Gobbo transprenos la taskon de *prof. d-ro Wim Jansen*, kiu emeritiĝos ĉi-jare kiel speciala profesoro. D-ro Gobbo (\*1974) estas unu el la plej aktivaj nuntempaj esperantologoj. Li estas i.a. estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED, la esplora fako de UEA) kaj recenzredaktoro de la revuo "Language Problems kaj Language Planning" (Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado).

La katedro Interlingvistiko kaj Esperanto estis starigita en 1998 laŭ la iniciato de la nederlanda fondaĵo Esperanto en la Instruado, kiu komence ankaŭ respondecis pri ĝia financado. En 1994 ĝi kunfandiĝis kun Internacia Esperanto-Instituto, kiu sekve fariĝis la sponsoro. Ekde la 1-a de septembro 2013 UEA transprenos la respondecon pri la katedro, kiu estas la sola universitata katedro pri sia fako en la mondo.

La katedro havas tri kuratorojn. Du el ili, *prof. d-ro A.P. Versloot* kaj *prof. d-ro P.C. Hengeveld*, estas nomumitaj de la universitato. Kiel la kuratoro nomumita de la financa garantianta funkciis ekde la komenco *mag. Hans Erasmus*, kiu ekde la nova studjaro estos sekvata de *mag. Nikola Rašić* kiel reprezentanto de UEA. Rašić ankaŭ partoprenis la elektadon de la nova profesoro kiel konsilanto.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA; N-ro 497)

### **3.5 Agnosko de la agado de AIS-Bulgario flanke de Bulgara Akademio de la Sciencoj**

Bulgara Akademio de la Sciencoj (BAS) oficiale celebris la 150-an naskiĝdaton de *prof. Ivan Ŝiŝmanov* – eminenta bulgara sciencisto kaj unu el la fondintoj de la Esperanto-movado en Bulgario.

La inaŭguro de la oficiala celebros okazis en la solena halo de la Akademio. Enkondukan parolon faris *prof. R. Damjanova*, prezidanto de la Organiza Komitato de la celbrado kaj gvidantino de la scienca projekto "Prof. Ivan Ŝiŝmanov kaj la modernigado de la bulgara humanisma scienco".

Post la enkonduka parolo la solenaĵon salutis *prof. E. Nikolov*, prezidanto de Bulgara Akademio de Sciencoj kaj post li *s-ino Margarita Popova*, vicprezidanto de Respubliko Bulgario, sub kies protektado estis organizita la solenaĵo.

Tuj post la salutparolo de la vicprezidanto de Respubliko Bulgario sur la oficiala tribuno estis alvokita saluti la solenaĵon *prof. Boĵidar Leonov* kiel prezidanto de AIS-Bulgario kaj de Bulgara Esperanto-Asocio. En sia salutparolo li esprimis la dankon por la honoro esti invitita partopreni la solenaĵon kaj pri la komencita kunlaboro inter Bulgara Akademio de la Sciencoj kaj AIS-Bulgario, pri la pozitiva rilato de la Akademio al la agado de AIS-Bulgario. Fine li honorigis la Akademion per la jubilea medalo "D-ro Zamenhof" transdoninte ĝin al la gvidantino de la solenaĵo. Tiu ĉi honorigo estis akceptita kun dankoj esprimataj de la Akademia Estraro kaj aplaŭdoj flanke de la ĉeestintaj akademianoj!

Post la salutparolo de *prof. B. Leonov* sekvis la salutparoloj de la bulgaraj universitatoj kaj sciencaj institutoj. Informo pri la solena inaŭguro estis prezentita dum la vesperaj novaĵoj de TV.

La sekvan tagon, dum la jubilea konferenco, *prof. Boĵidar Leonov* prelegis antaŭ la akademianoj kaj profesoroj de bulgaraj universitatoj pri la temo "La agado de AIS-San Marino, AIS-Bulgario kaj bulgaraj esperantistoj por realigo de la ideoj de *prof. Ivan Ŝiŝmanov* pri la apliko de Esperanto en la internaciaj kontaktoj inter la sciencularo". En la prelego li konatigis la ĉeestintojn kun la strukturo, celoj kaj la agado de AIS-San Marino. Li ankaŭ prezentis faktojn el la biografio de *Prof. Ivan Ŝiŝmanov* kunligitaj kun lia E-agado. La eminenta bulgara sciencisto estis ankaŭ aktiva esperantisto kaj en sia scienca agado, partopreninte diversajn internaciajn sciencajn seminariojn dum la jaroj 1920-1930 proklamis la ideon por apliko de Esperanto en la sciencaj kontaktoj inter la monda sciencularo.

*Boĵidar Leonov* [leonov@rozabg.com](mailto:leonov@rozabg.com)

## 4 Faka komunikado

### 4.1 Eseoj de *Wera Blanke* pri terminologia agado en Esperanto

Okaze de la 80-a naskiĝtago de *Wera Blanke* (02.03.2013) aperis kolekto de ŝiaj plej gravaj eseoj pri terminologia agado en Esperanto:

**Blanke, Wera (2013): Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj. (Red. Detlev Blanke). New York: Mondial, 316 S., ISBN 9781595692573.**

La libron eblas mendi ĉe la eldonejo Mondial (<https://sites.google.com/site/librojenesperanto/>), de d-ro Wolfgang Schwanzer ([wolfgang.schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de), ankaŭ vidu [www.esperanto-buchversand.de](http://www.esperanto-buchversand.de)), ĉe la libro-servo de UEA (<http://katalogo.uea.org/>) kaj aliaj libro-servoj (ankaŭ en la reto).

Jen la enhavtabelo:

**Enkonduka ĉapitro** (*Detlev Blanke*)

La libro

La biografio

#### I Faka apliko kaj terminologio

- (1) Faklingva komunikado en Esperanto
- (2) Faka apliko kaj terminologio en Esperanto. Ĉu hobbio aŭ seriozaĵo?
- (3) Kompreni la neceson kaj agi laŭ tio: faka agado
- (4) Prapioniroj de nia faka lingvo
- (5) Kiam estiĝis ISAE
- (6) Carl Støp-Bowitz – „ISAE-ano Numero Unu“



## **II La terminologio-scienco kaj lingvonormigo: signifo kaj planlingvaj radikoj**

- (7) Multlingva mondo kaj fakvorta normigado
- (8) Terminologio internacia – radikoj, tendencoj kaj rilatoj al Esperanto
- (9) Rilatoj inter planlingvoj kaj internacia lingvo-normigado –  
in memorian *Hans-Joachim Plehn*
- (10) Planlingvaj impulsoj por terminologoj: Wüster, Drezen, Warner.

## **III Principoj de termino-kreado**

- (11) Terminologiaj principoj de Esperanto
- (12) Terminologiaj principoj kaj ilia normigado – kelkaj aspektoj –  
in memoriam *Paul Neergaard*
- (13) Fakvortoj en Esperanto. Kion fari, se la vortaro ne plu helpas?
- (14) Principoj de terminologia laboro en Esperanto

## **IV Survoje al Terminologia Esperanto-Centro**

- (15) 6 Tezoj pri terminologia laboro
- (16) Proponoj pri terminologia laboro
- (17) Terminologia modelenketo (fako: psikoterapio)
- (18a) Terminologiaj rimarkigoj (letero de *Michael Lennartz*)
- (18b) Denove pri terminologio: letero de Wera Dehler (al *Michael Lennartz*)
- (19) Nova ŝanco por terminologio
- (20) Kion ni faru? Survoje al realigo de Terminologia Esperanto-Centro (TEC)
- (21) Seminario 1989 en Poprad
- (22) En la ĉefurbo de la terminologio
- (23) Rimarkoj de la redaktorino

## **V Provizora bilanco de TEC kaj iom da perspektivo**

- (24) Kelkaj personaj rimarkoj pri la nuna situacio
- (25) Terminologia Esperanto-Centro: spertoj, problemoj, perspektivoj
- (26) Fiero kaj honto – pri la sciala rilato inter Esperanto kaj Terminologio –  
kronologio
- (27) Kial kaj kiel revivigi TEC?

## **VI Pri kelkaj terminoj**

- (28) Pri kelkaj aktualaj terminoj
- (29) Pri terminoj el Vikipedio – ekzemploj el la teatra fako
- (30) Knedliko – ĉu terminologie bongusta?

## **VII Publike paroli**

- (31) Publike paroli – personaj observoj kaj kelkaj proponoj

## **VIII Recenzoj**

- (32) Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko? (de *Christian Darbellay*)
- (33) Malmulte promesas – multe plenumas.  
(pri “Infanpsikologio” de *Margrete Landmark*)
- (34) Porinfana Faklibro pri Film-Arto (de *Dončo Hitrov*)
- (35) Teatro sen lingva bariero (de *Belka Beleva*)
- (36) Komputika Leksikono (de *Sergio Pokrovskij*)
- (37) Seslingva Fakvortaro pri Internacia Poŝtservo (de *Algimantas Piliponis*)
- (38) Gvidilo en termin-arbaro (pri “Lexicon silvestre” de *Karl-Hermann Simon*)

## Mallongigoj

### Literaturo

#### Bibliografio de la Esperanto-rilataj publikaĵoj de Wera Blanke 1978-2012

## 4.2. Gvidlinioj de UNESCO: Politiko pri terminologio nun ankaŭ en Esperanto

La internacia informcentro por terminologio Infoterm (Vieno), en kiu UEA membras ekde 2011, instigis la Komisionon pri Terminologiaj Instancoj de UEA al tradukado de la Unesko-dokumento "Gvidlinioj por terminologiaj politikoj". La kelkdekpaĝa dokumento estas sistema referenco por ĉiu, kiu diversece deziras projekti, plani kaj efektivigi terminologian politikon por subteni daŭrigeblan evoluigon de sia lingva komunumo.

La originala anglalingva dokumento estis tradukita de *Geoffrey Sutton*, kaj fake kaj lingve reviziita de teamo. Fine de aprilo ĝi aperis en la retejo de Infoterm apud versioj en dek aliaj lingvoj. Kvankam la Esperanto-versio ne estas oficiala dokumento de Unesko, ĉar Esperanto ne servas kiel oficiala lingvo de tiu organizaĵo, ĝi aperis kun permeso de Unesko.

Aliaj terminologiaj projektoj komenciĝos baldaŭ. Interesatoj pri terminologio povos viziti la budon "Terminologio" dum la Movada Foiro de la 98-a UK en Rejkjaviko.

Gvidlinioj por terminologiaj politikoj:

[http://www.infoterm.info/publications/documents/GuidelinesforTerminologyPolicies\\_2005Final\\_eo.pdf](http://www.infoterm.info/publications/documents/GuidelinesforTerminologyPolicies_2005Final_eo.pdf)

(Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 498, 2013-05-02)

## 4.3 Spertaj profesiuloj pri lingvoj partoprenu normigan laboron

*Mélanie Maradan*

Fine de junio 2012 en Madrid (Hispanio) okazis kunsido de tutmonda teknika komitato pri terminologio kaj aliaj lingvaj kaj enhavaj rimedoj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) kiel kunlaboranta organizaĵo estis invitita aktive partopreni.

### Kio estas normigado?

Normigado estas la ellaboro de *teknikaj normoj*, t. e. formalaj dokumentoj, kiuj priskribas ekzemple objekton aŭ procezon. Teknikaj normoj verkiĝas kadre de organizaĵoj, kaj ne laste de *normigaj organizaĵoj*. Teknika normo kiu aperas kadre de normigaj organizaĵoj estas la rezulto de interkonsento inter spertuloj de la rilata kampo. Post publikado, ĝi povas esti uzita ekzemple laŭvole fare de privataj firmaoj (kutima ekzemplo estas ISO 9001 pri kvalito) aŭ laŭleĝe decide de registaroj aŭ similaj instancoj. Normigada laboro povas okazi je pluraj gradoj: regione, lande, kontinente aŭ internacie.

### Kial normigi?

Normigi permesas interkonsenti. Normigi en la kampo de fervojoj, ekzemple, permesas ke trajnoj veturu de unu lando al alia senprobleme, sen ke la relo-grandeco ŝanĝiĝu kaj kaŭzu praktikajn problemojn. Normigi permesas al sciencistoj interkomuniki, ekzemple pro kuna decido pri unuoj-sistemo: *metro, kilogramo, sekundo, ampero, kelvino*... Teknika normigado okazas en la plej diversaj kampoj, kaj inkluzivas lingvojn. *Aa (afara), ab (abĥaza), af (afrikansa), ak (akana), am (amhara), ar (araba), as (asama), ay (ajmara)*... Lingvokodoj, ekzemple, estas normigendaj kaj normigataj. Normiga produkto en finpreta formo ĉiam estas **kolektiva akordo** inter ne plene samopiniaj partioj. Por ke ĝi estu utila, necesas ke plejmulto

da vidpunktoj estu esprimitaj. Planlingvoj ankaŭ estas lingvoj, sekve ankaŭ planlingvanoj reprezentas esprimindan vidpunkton.

### **Kiu normigada laboro okazas internacie rilate al lingvoj?**

Ekzistas pluraj grupoj, kiuj pritraktas normigadon de lingvaj aspektoj. Grava instanco estas la teknika komitato de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kiu okupiĝas pri diversaj temoj rilate al lingvoj, ĉefe terminologio, sed ankaŭ interalie tradukado kaj interpretado. Tiu teknika komitato (formale nomita ISO/TC 37) konsistas el **dudeko da laborgrupoj**, kiuj siaflanke okupiĝas pri konkretaj projektoj. Rimarkindas, ke la laboro plej ofte okazas en la angla, kvankam la rusa kaj la franca same estas laborlingvoj de ISO.

### **Kiel partopreni en normiga projekto?**

UEA kiel kunlaboranta organizaĵo rajtas nomumi spertulojn en iu ajn el la laborgrupoj de ISO/TC 37. Tio volas diri, ke esperantlingva lingvisto povas anonci sin tiukadre por iu ekzistanta projekto kiu interesas ŝin aŭ lin. Partopreni en normiga projekto tute ne signifas prizorgi la rilatojn de UEA aŭ fari administradan laboron. Pri tiaj aspektoj okupiĝas UEA mem, pere de komisiito. Partopreni en normiga projekto sekve signifas esti **nomumita spertulo en iu laborgrupo** (nur en tiu laborgrupo), kaj fakte kontribui al iu normiga projekto (projekto de normo), partoprenante kunsidojn de la laborgrupo (surloke aŭ perinterrete), kontribuante al eventuala retlisto kaj komentante malnetojn de la normiga produkto.

Menciindas, ke ankaŭ UEA rajtas proponi novan normigan projekton. Tio, tamen, poste postulas konvinkadon de 10 ISO-membrolandoj pri la indeco de la pria temo. Verŝajne estas ĝis nun nepritraktitaj temoj, pri kiuj esperantolingvanoj povus interŝanĝi riĉajn spertojn kaj grave kontribui, ekzemple je la uzo de pontolingvo en tradukadoj homa aŭ maŝina. Ideoj ĉiukaze ĉiam bonvenas, kaj konkretajn proponojn oni povas prezenti al la komitato.

### **Kio konkrete okazas nuntempe?**

Jen kelkaj praktikaj ekzemploj:

*Ekzistantaj laborgrupoj:* laborprincipoj de la terminologia fako, harmoniigado de terminologioj, tradukado, interpretado, ontologioj, datuminterŝanĝoj, administrado de datumbazo, reprezentado de plurlingvaj informoj, lingvokodoj, leksikografio, terminografio...

*Ekzemploj de projektoj nuntempaj:*

- Ĝeneralaj gvidlinioj pri tradukoprojektoj<sup>2</sup>
- Interpretado – gvidlinioj pri “komunumo-interpretado” (*community interpreting*)
- Interkongruenco kaj interuzeblo de ontologioj<sup>3</sup>

## **4.4 4401 sciencaj kaj fakaj verkoj en Esperanto**

Por ricevi sian universitatan diplomon studentoj en Hungario devas fari ekzamenon ankaŭ pri iu fremda lingvo. En baza, bakalaŭra nivelo en multaj universitatoj ankaŭ Esperanto estas akceptata, sed en mastera grado (msc) – laŭ pasintjara leĝo – oni akceptas nur tiujn lingvojn, en kiuj pruveble ekzistas scienca kaj faka literaturo. Por helpi la studentojn de la koncernaj fakoj en la Esperanto-Centro Eventoj ni kompilis libro-liston pri fakaj verkoj kaj sciencaj libroj eldonitaj aŭ aperintaj en Esperanto – nekonsidere ilian nunan aĉetebilon.

Nia listo enhavas 4401 elementojn de la sekvaj fontoj:

<sup>2</sup> UEA sendis komenton pri aperinta malneto de la projekto.

<sup>3</sup> UEA nomumis spertulon por tiu projekto.

- ĉiuj materialoj de STEB (Scienca kaj Teknika E-Biblioteko) ĉe [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu);
- libroj en la libroservo de UEA en kategorio scienco kaj tekniko;
- libroj kun scienca kaj teknika enhavo en la katalogo de Kolektaĵo Fajszai;
- artikoloj el Scienca Revuo en retejo ĉe Eventoj;
- artikoloj el la scienca revuo Teleskopo;
- artikoloj el Jura Revuo;
- listo pri aperintaj vortaroj en la retejo de UEA;
- enhavo de la verko "Fakverkoj" de Miroslav Malovec;
- librolisto en broŝuro de Rátkai Árpád pri faka aplikado ktp.

Ni konscias, ke la listo tute ne estas kompleta, nia celo estis nur helpi la juran agnoskon de Esperanto en hungariaj universitatoj.

La kolektaĵo estas atingebla ĉe la adreso: <http://www.eventoj.hu/sciencverkoj/>

La nuna fazo (aŭtuno 2012) estas rezulto de plurmonata laboro. Se iu volas daŭrigi kaj plikompleti la materialon, volonte ni transdonas la fontan xls-dosieron. Vi povas reagi, kaj aldoni vian komenton en nia nova retpaĝo ĉe: <http://www.facebook.com/Ret.Info>

Ni ĝojas, se ni povis iom helpi al la prestiĝo de Esperanto.

La kompilintoj *Szilvási László* kaj *Mészáros István*,

(Red.: Vidu krome:

<http://esperantomovado.blogspot.be/2012/12/pli-ol-4400-fakaj-verkoj-en-esperanto.html?sref=fb>)

## 4.5 *Scienca Revuo* sur DVD-o

